

Kial unu Dolmeno en Baugé ?

(Prelego Pasko 1966)

La vorto dolmeno signifas ŝtonotablo. Ĝi estas farita el du keltaj radikoj : dol = tablo ; men = ŝtono. Laŭ la kelta sintakso oni devas kompreni, ne tabloŝtono sed, kiel antaŭe dirite, ŝtonotablo.

Kaj tuj mi devas detrui eraron : oni ĝenerale kredas, ke, se la nomo estas kelta, enkaŭ la aĵo tiel nomata estas kelta. Sed la dolmenoj apartenas al antaŭkelta periodo, same kiel la plej granda parto el la megalitoj. Oni trovas ilin tie, kie neniam la keltaj triboj vivis, kaj oni precize kalkulis, ke ili estis starigitaj antaŭ la alveno de keltoj.

Kial do oni nomis ilin tiel ?

Oni tiel nomis ilin, unue ĉar oni erare pensis, ke ili estis starigitaj de keltaj triboj, due, ĉar ili estas grandamase troveblaj en Bretonio kaj en aliaj Okcident-Eŭropaj landoj, kie vivis keltoj ; sed la du faktoj estas sendependaj.

La vorto *dolmen*, estis kreita nur dum la dekoka jarcento de kelkaj personoj, kies keltaj sentoj estis pli ol ordinare grandaj.

Ĝis nun, mi parolis nur negative.

Tri problemoj aperas koncerne la dolmenojn :

Kiam kaj de kiuj ?

Kiel ?

Kial ?

Ni pritraktu la unuan problemon.

Ni nun scias, ke la Indo-eŭropaj grupoj kaj triboj ne estis la unuaj okupantoj de Eŭropo. Antaŭ ili, aliaj grupoj ekzistis tri mil aŭ kvar mil jarojn antaŭ kristnasko. Kiam la unuaj keltaj triboj alvenis al Okcident-Eŭropo ili trovis ĝin en stato de megalita civilizado de Svedio al Portugalio. Tiu megalita civilizado ekzistis ne nur en Eŭropo sed ankaŭ en Azio. Eble tiu ekstreme grava fakto, tiu impona fenomeno nomata religio naskiĝis inter la megalitaj popoloj.

Je tri mil jaroj antaŭ kristnasko, tiuj popoloj kreis unu el la plej maljunaj skribaj lingvoj : la kuneiforma.

Jen do la respondo al la unua demando : la dolmeno en Baugé verŝajne estis starigita per triboj antaŭ ilia kreado de skriba lingvo, tio estas proksimume tri mil kvin

cent jarojn antaŭ kristnasko, ĉar poste ili estus skribintaj, se ne tutajn frazojn, almenaŭ kelkajn vortojn sur tiuj megalitoj.

La dua problemo estas : kiel ?

Kiel tiuj primitivaj homoj povis transporti tiel pezajn ŝtonegojn kiel, ekzemple, tiuj troveblaj apud Rennes ĉe la Roche-aux-Fées (La Roko de la Feinoj). Kelkaj ŝtonegoj pezas proksimume 40 aŭ 50 tunojn, kaj oni scias, laŭ la naturo de la ŝtonoj, ke la plej proksima loko kie ili estas troveblaj estas je distanco de 4 - 5 kilometroj !

Ĉar neniu el ni ĉeestis iun ajn megalitan kongreson, ni povas nur imagi la metodon : oni verŝajne uzis grandan amason da homoj puŝantaj aŭ tirantaj la ŝtonegojn metitajn sur arbotrunkoj. Oni puŝis, metante arbotrunkojn sur la vojon, antaŭen, deprenante la arbotrunkojn de sur la vojo, malantaŭ la ŝtonoj, kaj metante ilin sur la vojon, antaŭen, ktp. laŭ la sekvantaj desegnaĵoj :

